

Numero:223 .
Decembro 2010.

18-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Kristnaska nokto

Benita estas ĉi nokto, kaj ĉies koro revas pri amo. Sidi en la varma ĉambro kie en la angulo staras la ornamita pinarbo. Ankoraŭ antaŭ kelkaj horoj infanoj laŭtis kaj ekscitite malfermadis la skatolojn.

La ricevitaj donacoj ĝojigis ilin, kaj ili brilokule kuregadis en la domo. Malrapide, sed fine tamen ili laciĝis, kaj ili ĉiuj feliĉe dormis en siaj litetoj.

Restis la pinarbo sola en la malhela ĉambro.

Unue ĝi nur staris ĝuante la varmon. Ekstere en la arbaro liaj kunuloj restintaj tie nun tremas pro la frosto. Sed ĝi, kiel feliĉulo pasigas la Sanktan Nokton en agrable varma ĉambro.

Ĝi estis eksterordinare fiera. La pinarbo nun volonte ekdancus, ĉar ĝi estis tre feliĉa.

Kiom longe daŭros ĉi bona vivo? – Ĝi ankoraŭ ne sciis. Estus bone, se ĝi povus resti tie ĉi por ĉiam kaj ĉi belega nokto neniam forpasus.

En ĝia koro estis paco kaj trankvilo. Tiu ĉi sento donis ĝojon al ĝi.

Se nun ĝiaj kunuloj vidus ĝin, certe ili avidus, kaj volus pasigi la nokton en domo.

Tiam subite ĝi ekmemoras pri multaj homoj, kiuj nun sen domo pasigas la malvarman nokton. Kiu scias, kie ili vekigis matene, se ankoraŭ ili vivos.

Estus bone kredi, ke ĉiu homo sidas en varma ĉambro kaj admiras la bele ornamitan pinarbon.

Ni malfermu nian koron kaj ni lasu veni al ni niajn homfratojn. Ni kredu, en iu tago ni apartenos al granda familio. Ne nur unu tago de la jaro estu paca kaj trankvila, sed ni klopodu vivi homece, por ke nia mondo fariĝu bona loko en la vasta universo.

Kion sugestas al ni la pinarbo ĉi nokte?

Ĉu pacon kaj trankvilon? Ambaŭ. Kristnasko temas pri tiuj.

Kial ne estas ĉiutage Kristnasko? Alifoj la homoj malamikas. Ne sufiĉas nur unu tago, se ni deziras pli bonan mondon.

Tion sciis ankaŭ la bele ornamita pinarbo.

-Redaktanto-



Ni lernu Esperanton!

-Kial mi lernu Esperanton? – demandis de mi viro, kiam li eksciis, ke mi estas esperantisto – Laŭ mi la grandaj mondolingvoj estas pli utilaj.

Ĉu li pravas?

Ni, geesperantistoj scias, ne. Esperanto estas neŭtrala lingvo. Se ĝin oni lernas amase, tiam post kelkaj jaroj aŭ jardekoj ĝi disvastiĝus, kaj la zamenhofa lingvo fariĝus la unusola helplingvo en la ĉiutaga komunikado.

Do, mi instigas ĉiun, ke ili lernu Esperanton! Neniam kredu, ke per tiu ĉi lingvo oni ne povas komuniki.

Esperanto estas facile ellernebla lingvo. Neniu asertas, ke ĝin oni ne devas lerni. Sen lernado ne ekzistas lingvoscio.

Ankaŭ esperantistoj ĉiutage devas ekzerci la lingvon. Sed tion ni scias. Ni korespondas, babiladas eĉ laboras per ĝi.

Ni rekomendu al niaj gekonatuloj lerni la Internacian Lingvon!

-S-



Verda stelo

Mi rigardis supren al la nokta firmamento. Miliardoj da steloj brilis kaj ili ĉarmigis min. Mi ŝatas rigardi la stelojn. Ilia rigardo trankviligas min.

Kiom da steloj! Ili estas ĉiuj ege foraj mondoj. Eble ankaŭ sur ili vivas homoj kaj rigardas nian terglobon.

Kiel ni povus komuniki kun ili, se hazarde ni estus renkontiĝantaj?

Efektive, kiel? Ĉu vi jam pensis pri tio? Per kiu lingvo ni parolos kun ili?

Kiu diros tion al ni?

Neatendite verda steleto kuris tra la firmamento. La stelo de la esperantistaro. Tiu eta stelo diris al mi la solvon.

Ankaŭ en la universo Esperanto fariĝos la helplingvo, se alvenos la tago de la renkontiĝo.

-K-

Renkontiĝo kristnaske

Antaŭ Kristnaskaj festoj ankoraŭ estis unu semajno.

Infanaĝe li ĉiam tre atendis tiun ĉi belegan feston. Onidire ĝi estas la festo de 1^a amo. Ĉu vere? Estus bone kredi, ke jes.

Sur la stratoj la homoj iris kun grandaj pakaĵoj en la neĝado. Jam ekde tri tagoj neĝis. Ĉion kovris granda neĝo.

Li ŝategis la neĝon. Longajn minutojn li povis rigardi la falantajn neĝerojn. El la grizega ĉielo falis la grandaj flokoj, kaj la tutan urbon kovris blanka neĝo.

Malrapide li ekiris al la centro de la urbo.

Hodiaŭ li estis libera. Li ne devis labori. En la fabriko apenaŭ laboris iu. La kolegoj ĉiuj libertempis. Ili ĉiuj prepariĝis al la festo.

Oni atendas ĉi feston malpacience kaj ĝi rapide forpasas.



Li haltis antaŭ montrofestro kaj li rigardis ĝin. Kion aĉeti al Maria? - Li ne sciis. Li jam longe cerbumis pri la donaco. La knabino certe ĝojos ricevonte la donacon.

Li iris plu. En tiu ĉi vendejo ne estis taŭga aĵo, kiun li volonte estus doninta al ŝi.

Ankaŭ Kristnasko estas jam negoco. Ĉio temas pri mono. Vendi kaj vendi. Forvendi la tutan mondon.

Kie estas la iamaj, belegaj Kristnaskoj? Ili forpasis. Restis nur memoro. La odoro de la pinarbo. Varma ĉambro. Ekstere sur la stratoj homoj rapidas al la preĝejo.

Maria promesis al li, ke ili renkontiĝos kristnaske. Antaŭhieraŭ li parolis kun ŝi per telefono. Li ĉiam ĝojas, se li aŭdas ŝian mildan voĉon.

Ŝi vokis lin tute neatendite. Li sidis en la ĉambro, kiam ektintis la telefono. Li tuj sentis, ke la knabino vokas lin.

Lia koro ekpulis kaj kuregis al la telefono.

-Alo! – li diris ekscitite – Ĉu vi estas Manjo?

Ili longe babiladis. Li jam delonge ne aŭdis ŝian voĉon.

Maria longe forestis en Usono. Ŝi vizitis sian onklinon. Dum la adiaŭante li diris al ŝi:

-Certe vi restos en Usono. Via onklino serĉos por vi edzon.



Ŝi nur ridetis kaj diris nenion. Maria ekkaresis lian malvarman vangon kaj ŝi ekiris por enaviadiliĝi.

Doloris al li, ke ŝi ne retrorigardis ĝis ŝi malaperis en la konstruaĵo

Pasis longaj semajnoj, eĉ monatoj. La knabino sendis nek leteron nek ŝi telefonis al li. Kiam ili adiaŭis, li donis al ŝi sian retadreson.

-Rete ni povos renkontiĝi ĉiutage – li proponis al ŝi.

Ŝajne la knabino volonte akceptis tiun ĉi eblon. Tio iomete trankviligis lin kaj esperis, baldaŭ li ricevos respondon el Usono.

Li sendis leteron per fulmopoŝto, sed neniam alvenis respondo. Li plurfoje provis al ŝi viziti diversajn retbabilejojn, kie ili povos renkontiĝi preskaŭ ĉiutage.

Maria malaperis. Lia antaŭsento plenumiĝis. La knabino restos por ĉiam en Usono.

Ankoraŭ en la flughaveno li nur ŝercis pri la onklino.

Tio ege ĉagrenis lin. En lia koro ekflagris la famo de la amo.

Kio okazos, se ŝi ne revenos?

Li ne sciis.

La tagoj pasis tre malrapide kaj triste.



Li jam esperis nenion, kiam en iu nebula, aŭtuna tago en la leterkesto de la komputilo li trovis mesaĝeton.

„Baldaŭ mi alvenos hejmen. Pli detale poste. Mi amas vin.

Tiuj ĉi kelkaj vortoj ĝojigis lin. Li flugis pro la ĉiela feliĉo. Maria ne edziniĝis al iu riĉega, dika usonano. Ŝi restis por li. Grandioze!

Dum la tuta tago li pensis pri ŝi. Tage kaj nokte li rememoris pri la kune pasigitaj horoj kaj minutoj.

Li estis ekscitita, kaj atendis Marian. Kristnaske ili renkontiĝos. Li ankoraŭ neniam atendis tiom malpacience ĉi feston.

Li iris ebriiĝante sur la lumigita strato kaj li pensis senĉese pri la knabino. Ili renkontiĝos Kristnaske.

Kiom longe li devas atendi ankoraŭ? Ĉiu homo atendas ion.

Kristnasko temas pri atendado. Atendi estas tre malfacile. Ankaŭ li sciis tion bone kaj tial ĝis la festo unu semajno estis tre longa. Tamen la scio, ke li renkontiĝos kun Maria tio donis al li forton kaj orumis lian vivon.

-Apáti Kovács Béla-



Poezio

KRISTNASKO

Kristnasko. Val' kaj montet'
Kovritas de densa neĝret'.
Jes, la mondo senmanke
Brilas blanke, blanke.

Fenestroj briletas vilaĝe,
Surtablo kukoj videblas,
Paĉjo, fraĉjoj pafas kuraĝe,
La infanaro ĝoj-saltetas.
Pro plezuro jubilas, radias.
Ĉambroplanke la pajlo sternitas;
Kun infanoj panja kant' magias.
La reĝ' ĉiela jen por ni naskitas.

Kristnasko. Val' kaj montet'
Kovritas de densa neĝret'.
Jes, la mondo senmanke
Brilas blanke, blanke.

Enkabane virin' sidas
En hommuta senparolo,
La infanon mortas vidas,
Ah, brakkruce, sur la pajlo.
Nur feble lum' kandela brilas
La virin' de l'spasm' trafita
Plu kantas, krevas kor' ŝia:
La reĝ' ĉiela por ni naskitas.

Kristnasko. Val? Kaj montet'
Kovritas de densa neĝ'.
Jes, la mondo senmanke
Brilas blanke, blanke.

August Ŝenoa (1838-1881)
El la kroata: Lucija Borĉić



DUM LA KRISTNASKA NOKTO

Mi vidas vin, kristnarbo kara,
Plena de l' lind; de l' sankta ĉarmosnet'
Sur vi ade man' iu vicigis
Cent belaĵojn – da donacoj cent.
Tiun manon patrinan mi konas...
Kie arbet'? ... Estis nur enreve...
Eksterdome la vent' tombe hantas.
Sen kompato kurlas ĝi ĝiskreve.
Mi eksentas: ne plu mi ŝin havas.
Patrin' kara!... Delonge en tombĉelon
Nigran vi falis mortofere,
Mian lastan idealo-celon!

Ah, ne veu, mia riĉa mondo,-
Ĉar priploras mi panjon en solo,
Sed vi ĝoju pri la morgaŭo,
Sanktanokte ĝoju kun l' popolo.
Sur kristnasarbo kandelojn bruligu,
Vi ne zorgu ke 'suferant' ne ridas.
Ja varmegas en viaj salonoj,
Vi ne zorgu ke iu enfridas.
Vi plenĝoju ĉe l'brilo kaj oro,
Verda pino kaj donaca ĉaro,
Gloru la Kreintan ĉiopovon,
Kiu venis por savi l'homaron.

Vi ja ĝoju! Sed la popol' povra
Plu suferas en la nokto sankta
Kaj mi juna triste min demandas
Kiam venos tag' ilia sava?
La popolon mi helpus ne krevi,
Ne suferi, ne mizeri plu,
Sed sin savi, sin foje relevi.
Mi starigus kristnasarbon pro graco
Al Istrio - Kroata popolo,
Por de l' arbo vidi beldonacon,
Beldonacon, oran libervolon!

Rikard Katalinić Jeretov (1869-1954)
El la kroata: Lucija Borĉić



Por infanoj



Kristnasko de la leporeto

Fore de la vilaĝo sur vasta kamparo vivis la leporeto en dometo. Kiam jam ĉion kovris la granda, blanka neĝo ĝi tre malgajiĝis.

Baldaŭ alvenos Kristnasko kaj ĝi denove estos sola.

Kiom bonege estus soleni ĉi feston en familia rondeto kaj tra la fenestro rigardi la neĝofolkajn! Ĝi ankoraŭ neniam travivis tian kortuŝan vesperon.

Malgaje ĝi revadis sidante apud la fenestro, kaj ĝi rigardis eksteren.

En la malproksimo ĝi ekvidis pinarbon, kaj tiam abrupte venis ideo en ĝian kapon.

Ĝi aranĝos Kristnaskon por la bestoj de la arbaroj kaj kamparoj.

La leporeto eksaltis, kaj tuj komencis prepariĝi. Ĝi kuris al la sciuro, kiu havis multe da nuksoj, aveloj kaj diversaj fruktoj, kiujn ĝi kolektis ankoraŭ somere.

-Bonvolu pruntedoni nuksojn kaj avelojn, ĉar mi deziras aranĝi Kristnaskon!



La sciuro ĝojegis ekaŭdante la peton kaj kompreneble ĝi volonte helpis, eĉ ĝi ofertis sian helpon.

Nun jam ili kune faras la ornamadon de la pinarbo.

Ili febre laboris tage kaj nokte. Ilin ne ĝenis la frosto kaj la malbona vetero. Ĉiutage ili eltrovis ion per kio la arbo estis plibeligita.

Kiam alvenis Kristnasko ĉio estis preta. El ĉielo eĉ la steloj venis helpi, kaj ili sidiĝis sur la branĉojn de la pinarbo. Tiel ĝi estis bele lumigita.

La bestoj interesiĝante kaŝrigardis la prepariĝon kaj dum la sankta vespero ili kolektiĝis ĉirkaŭ la pinarbo.

Estis eta problemo. En la vilaĝo sub la pinarboj ĉie estis donacoj.

La leporeto mallaŭte diris al la orelo de la sicuro:

-Ni forgesiĝis pri la donacoj. Kion ni donu al la bestoj. Rigardu kiom da bestoj kolektiĝas por festi Kristnaskon.

Ankaŭ la sciuro estis senkonsila, kaj ĝi ne sciis kion fari.

Ili timis, ke la bestoj koleriĝos, se ili ne ricevos donacon.

Kion fari en tiu ĉi situacio?

Kiam en la vilaĝeto ektintis la sonorilo de la preĝejo, ĉiom da bestoj de la arbaro kaj kamparo ĉeestis. Ili ĉiuj serĉis la donacon, kaj post iom da tempo ili diradis:

-Kia estas ĉi Kristnasko? Neniu el ni ricevis donacon. En la vilaĝo la homoj trovas multe da pakajoj sub la pinarboj.

Ili jam volis iri hejmen, kiam la oĉjo urso alvenis kaj ĝi silentigis la malkontentulojn.

-Aŭskultu min karaj miaj! Ne ĉagrenu! Vere sub la pinarbo ne estas donacoj por ni. Ne koleru pro tio pri la leporeto kaj sciuro! Ili volis kaŭzi ĝojon al ni



per la ornamita pinarbo. Ni ricevis la plej belan donacon: la amon. Do, ne ĉagrenu, eĉ estu dankemaj al la leporeto kaj sciuro, kial ili surprizis nin!

La kunvenitaj bestoj konsentis kun la oĉjo urso. Poste jam neniu ĉagrenis pro la manko de la donaco, eĉ ili gaje ekkantis kaj deklamadis belajn kristnaskajn poemojn.

Apenaŭ forpasis unu horo ĉirkaŭ la pinarbo, la bestoj fartis hejmece, kvazaŭ ili estus en iu domo de la vilaĝo.

Ankoraŭ neniam estis tiel belega la Kristnasko en la arbaro, kiel ĉi vespere. La malamikoj paciĝis kaj kune sidis aŭ dancis sur la arbara maldensejo.

Noktomeze ĉesis neĝi, kaj sur la firmamento ekaperis la steloj, kvazaŭ ili salutintus la bestojn, kiuj dank' al la leporeto kaj sciuro kune pasigis en paco la sanktan nokton la naskiĝon de Jesueto.

-Onklo Adalberto-



(AVENTUROJ EN ESPERANTUJO de la tria ĉapitro estos legebla en la januara numero)


Gajaj bildoj



-Bedaŭrinde ni ne havas komunan lingvon



Ili ne komunikis per Esperanto



Internacia brigado

Lingva miskompreno



-Ĉu laŭ vi, li deziras lerni Esperanton?



-Mi ege bedaŭras, sed ŝi parolas Esperanton.



-Sinjoro policisto, mi estas la landa peranto de UEA